

La Riverego

| | | | |
|---------------------------------|----|-----------------------------------|----|
| Nova E-libro el Kebekio | 2 | Pacaj mesaĝoj el Hiroŝimo | 16 |
| MEKARO 2013 en Otavo | 3 | Amuza sceno en <i>interlingua</i> | 17 |
| Esperanto en Radio Kanada | 4 | La Bona Lingvo | 20 |
| Japana taglibro (parto 3) | 5 | Z-tago en Montrealo | 23 |
| Originalulino en la Blanka Domo | 15 | NASK en Nord-Karolino | 24 |

MEKARO 2013 :
Bienvenue à Ottawa !

MEKARO 2013 :
Bonvenon al Otavo !

Nova libro el Kebekio aperis en Esperanto

Vi ja scias, ke en 2012 ESK festis sian 30-jariĝon, la Montreala Esperanto-klubo festis sian 50-jariĝon kaj Esperanto — sian 125-jariĝon.

Ideo pri memorlibro venis en aŭtuno 2012, kaj rapidege Zdravka Metz eklaboris por pretigi manuskripton, kiu jam pretis por la Zamenhofa festo en la pasinta decembro. Francisko Lorrain kaj Suzana Bolduc fervore kunhelpis por revizii la tekston kaj multe pli. La libro prezentas ne nur la lastajn 30 jarojn da E-agadoj en Kebekio, sed ankaŭ koncize la komencon de la Movado antaŭ jarcento. Ĝi enhavas 130 kolorajn fotojn.

La libro « 30 jaroj da agado » aĉeteblas por 20 \$ + sendkostoj (ene de Kanado : 5 \$, Eŭropo : ŝipe 12 \$, aviadile 35 \$; Usono surface : 10 \$). Vi povas mendi kaj pagi (PayPal) pere de nia retejo : www.esperanto.qc.ca (klaku sur « pliaj informoj » kaj « donacilo »). Bonan legadon !



Estu vi regiona kontakto !

Foje, ne tro ofte tamen, iu skribas al nia societo por demandi, ĉu estas aliaj esperantistoj en lia/ŝia regiono. Ni ĉiam hezitas doni nomon kaj retadreson, ĉar ni ne scias, ĉu tio povus ĝeni vin.

Dum la lasta estrara kunsido venis ideo, ke ni provu denove starigi reton da kontaktuloj tra Kebekio.

La ideo estas simpla. Se vi akceptas esti tia persono, kiam en la estonteco iu skribos al ni

petante esperantistan kontakton en sia urbo aŭ regiono, ni simple sendos informojn pri vi. Tiel la persono povos eventuale renkonti vin por diskuti pri la lingvo, la movado kaj tiel plu. Tio povus esti granda helpo kaj kuraĝigo al novulo.

Do, ĉu vi pretas helpi ? Simple kontaktu nin por anonci vian sinproponon.

Antaŭe dankas vin
Normando Fleury,
Prezidanto de ESK



Bonvenon al la 10-a Mez-Kanada Renkontiĝo !

Otavo, Ontario, Kanado, 18 – 20 majo 2013. Aliĝu ĉe www.mekaro.ca

MEKARO estas la Mez-kanada renkontiĝo de esperantistoj. Ĉiun jaron dum la longa semajnfino en majo ni kunvenas alterne en malsama urbo en Ontario aŭ Kebekio. MEKARO estas turisma semajnfino en Esperanto por lerni pri la gastiga urbo, gustumi la lokajn frandaĵojn (kaj bierojn), konatiĝi kun novaj amikoj kaj simple pasigi tempon en bela varma esperantista etoso.

Ĉi-jare estas la vico de Otavo gastigi la renkontiĝon ! Otavo, ĉef-urbo de Kanado, havas 700 000 enloĝantojn. Kun Gatineau, tuj aliflanke de la

Otava rivero, la du-lingva regiono de la federacia ĉef-urbo havas milionon da enloĝantoj. Otavo estis fondita kiel Bytown en 1826, pro la konstruado de la kanalo Rideau, parto de la monda heredaĵo de Unesko. Kiam la konstruado finiĝis, en 1832, Bytown havis mil enloĝantojn. Otavo ricevis sian nunan nomon, kiu venas de la algonkina vorto adawe, « komerci », en 1855, kiam ĝi ricevis la titolon de urbo.



La nuna Otavo estas moderna kaj vigla urbo. Ĝi havas du universitatojn, kaj en Gatineau ankaŭ estas plia universitato. Pli ol duono de la enloĝantoj havas kolegian aŭ universitatan diplomon, kaj Otavo havas la plej altan proporcion de inĝenieroj, sciencistoj, kaj doktoriĝintoj en Kanado. La federacia registaro, kompreneble, estas la plej granda dunganto en Otavo ; estas pli ol 110 000 ŝtat-oficistoj en Otavo kaj Gatineau. Tamen estas ankaŭ grava teknologia industrio: pli ol 1800 teknologiaj kompanioj kun entute pli ol 80 000 dungitoj.

Otavo ankaŭ estas fama pro siaj muzeoj : muzeo pri civilizacio, muzeo pri naturo, belarta muzeo, muzeo pri scienco kaj teknologio. Estas ankaŭ aliaj, malpli konataj, interesaj muzeoj, ekzemple, muzeo pri nuntempa fotado, muzeo pri mono, muzeo pri flugado kaj spaco, eĉ muzeo pri skiado ! Dum MEKARO ni vizitos unu el tiuj malpli konataj muzeoj.

Loka organizanto: Yves Bellefeuille
<[yan\(ĉe\)storm.ca](mailto:yan(che)storm.ca)> | www.mekaro.ca

Esperanto en Radio Kanada Internacia

Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto kaj 30-jariĝo de ESK, Radio Kanada Internacia aperigis kvar intervjuojn pri Esperanto : en la angla (kun Joel Amis, Montrealo), franca (kun Normand Fleury, Montrealo), hispana (kun Luis Castro, Montrealo) kaj en la ĉina (kun John Huang, Vankuvero). Ĉiuj intervjuoj estis tiom popularaj, ke dum kelkaj semajnoj ili aperis sur la unua paĝo en la rubriko « viaj elektoj » kaj ricevis plurcent ŝatojn en Facebook. Krom tio, aperis tutpaĝa intervjuo kun Normand Fleury (Montrealo) en la franclingva montreala ĵurnalo *Le Devoir*, kaj nia Avo Frosto menciigis en la senpaga montreala ĵurnalo *24 Heures*.





Obama (ne tiu, alia !)

Ĵenĵa (Yevgeniya) Amis

Parto III (legu la komencon en La Riverego 109)

Nous avons appris l'existence de la petite ville japonaise d'Obama lorsque Barack Obama est devenu président en 2008. À cette occasion la télévision a présenté des enfants de cette ville se réjouissant de ce que celui-ci ait été élu. Bien sûr, la ville n'a pas été nommée en l'honneur de président américain : en japonais le mot « obama » signifie « petite plage ».

Ni eksciis pri japana 30-mil-persona urbeto Obama ĝuste kiam Barack Obama elektiĝis kiel prezidento la unuan fojon, en 2008 : oni montris televide infanojn de la urbo Obama ĝojegi, ke la persono, kiu dividas la nomon kun ilia urbeto, elektiĝis kiel prezidento. Kompreneble, la urbeto ne estis nomita honore al la usona prezidento — la vorto « obama » en la japana signifas « eta plaĝo ».

Ĉefbonzo salutas nin Esperante !

De Kioto ni trajnas norden, trans la alta montoĉeno, direkte al la Japana maro. La urbo Obama situas apud la maro, en la regiono Hokuriku. Kvankam malgranda, la urbo estas tre riĉa je historio kaj kulturo. Nia unua halto estas Mjocu-ĵi-templo, kies trietaĝa pagodo, kiu staras jam ekde 1270, estas listigita kiel Japana Nacia

Trezoro. La vizito al tiu ĉi trankvila loko por ni estas aparte speciala, ĉar ĝia ĉefbonzo, s-ro Nakaĵima, venis por saluti nin... Esperante ! Fakte, li estas lernanto de nia gvidanto en Obama-regiono, s-ro Kitagaŭa, kaj li tre diligentas pri la lernado.

Manĝinte la bongustan kaj tre sanan specialaĵon de Obama — oroŝi-soba (nudeloj el fagopiro kun raspita rafano), ni zigzagis tra la montaraj vojoj por vidi la Obama-golfon. El la fenestro ni rimarkas la buston de Obama (ĉi-foje, la prezidento !) : ĝi staras apud la vendaŭtomato sur kiu estas skribite « I ♥ Obama ». La skulptaĵo staras apud hotelo, kies posedanto estas granda ŝatanto de s-ro Obama, klarigas nia bonkora ĉiĉerono.


Montoj, maro... atomcentralo

La vido de la montoj al la plaĝo estas vere spirprena. Bedaŭrinde, malantaŭ kelkaj el tiaj belaj montoj kaŝiĝas io, pri kio la lokaj politikistoj eble ne tre ŝatas paroli : atomcentralo... « Tre

danĝera loko por atomcentraloj, pro la tertremoj kaj la proksimeco al la maro », diras nia ĉiĉerono. Multaj lokanoj — inkluzive la jam konatan s-ron Nakaĵima — estas engaĝitaj en la movado kontraŭ

atoma energio, kaj ilia voĉo multe plifortiĝis post la tragedio en Fukuŝima. Fakte, unu el la konstatoj de mia edzo Joel, kiu loĝis en Japanio antaŭ dek jaroj estis, ke Japanoj fariĝis multe pli ŝparemaj pri la uzo de energio : se antaŭe ĉiuj lampoj lumis en la trajnoj, nun nur duono estas lumigitaj, kaj oni multe malpli klimatizas en publikaj lokoj. (Mi nur povus imagi, kia estus reago de Japanoj, se mi dirus, ke en mia laborejo en Atlanto oni klimatizis la laborejon ĝis tiu grado, ke nemalmultaj koleginoj uzis porteblojn

hejtilojn por varmiĝi !) En Kioto ni eĉ vidis manifestacion por plena nuligo de atoma energio, kaj esperantistoj, eksciinte, ke mi naskiĝis proksime al Ĉernobil, multe demandadis pri la akcidento kaj ĝiaj sekvoj.



S-ro Nakaĵima apud la tri-etaĝa pagodo de Mjocu-ĵi-temple

De Obama ni veturas al la ĉefurbo de la gubernio, la urbo Fukui, preterpasante multajn tunelojn — ni ja estas en la montaro. Antaŭ la milito, Fukui estis konata pro sia silka industrio — sed nuntempe malmultaj Japanoj portas silkajn kimonojn, kaj pro tio la industrio ŝrumpis. Ni renkontiĝas kun la Esperanto-grupo de s-ro Kitagaŭa en la bela Internacia Centro. La plejparto de liaj lernantoj estas komencantoj, kaj ili vigle interesiĝas pri ni kaj la vivo en Kanado, kaj eĉ prezentas al ni bonvenigan novaĵleteron, preparitan speciale por tiu ĉi okazo.

Ses homoj, ses katoj, du hundoj kaj kelkdek kokoj

Por tranokto ni veturas al profunda kamparo. Tie, en la montoj, situas terkultivista komunumo Hoeiĝuku — kiu tre favoras al Esperanto kaj kun kiu amikas s-ro Kitagaŭa. Unu el la membroj de la komunumo, s-ino Ŝima, bonvenigas nin en Esperanto kaj informas, ke en tiu ĉi loko loĝas ses personoj, ses katoj, du hundoj kaj kelkdek kokoj.



Ĝuante la manĝaĵon kaj babiladon en Hoeiĝuku

Neniu el la personoj estas parencoj, kaj ili ne apartenas al iu ajn religio : simple unu tagon ili decidis loĝi kune en la kamparo kaj kultivi la teron. Kvin el ses membroj estas sufiĉe aĝaj (inter 50+ kaj 70+), sed antaŭ kelkaj jaroj al Hoeiĝuku aliĝis plia membro : 12-jaraĝa Ai-ĉan, kiu nun estas 15-jara ĉarma kaj timida sunbruniĝinta junulino. La historio de tiu ĉi komunumo, eble meritas tutan libron, sed jen mallonga versio.

Ĉio komenciĝis antaŭ ĉ. 30 jaroj, kiam s-ro Tanizaki, kiu havis sian propran universitat-preparan lernejon, kie li mem instruis la anglan kaj matematikon, ekhavis dubojn, ĉu tio, kion li

faras, estas bona en la pli granda senco. Lia respondo al tiu lia propra demando estis nea, kaj tiel li decidis anstataŭ la anglan instrui Esperanton. Kompreneble, li tuj perdis multajn siajn lernantojn... Poste li decidis fari eĉ pli

drastan paŝon — kun siaj amikoj el Tokio, kelkaj iamaj lernantoj, li decidis translokiĝi al kamparo, por ĝui la vivon en la naturo, sanajn manĝaĵojn kaj por instrui pri tio al aliaj. Ili do aĉetis domon kun terpeco, kaj kun la tempo konstruis pli grandan domon (la strukturon faris profesiaj konstruistoj, sed ili mem faris ĉion alian : murojn, plankon, ili rakontas fiere). Oni decidis nomi la komunumon Hoeiĝuku, kiu en loza traduko signifas « kreskigi la saĝon ».

Kiel la urbanoj fariĝis terkultivistoj

Ĉiuj anoj de la komunumo estis tokianoj, kiuj neniam antaŭe kultivis la teron : ili lernis tion legante librojn kaj parolante kun maljunaj kamparanoj. S-ino Ŝima rakontas, ke ŝiaj gepatroj estis tre skeptikaj pri tiu ĉi decido. Urbanino, laboranta kiel teksisto kaj kuiristo (ĉar unu laboro ne sufiĉis por vivteni sin), ŝi neniam antaŭe kreskigis legomojn. Nun ŝi tute ne imagas reveni al la urba vivo : « Mi ofte devas iri al Tokio por



viziti mian maljunan patrinon, kaj mi ne povas imagi loĝi en tiu urbo, kie ĉio tiom malbongustas », ŝi diras. (Kurante antaŭen, mi devas diri, ke mia edzo kaj mi ja tute ŝatis la manĝaĵojn en Tokio, sed mi tamen rimarkis, kiom elĉerpitaj estas multaj tokianoj : veturante ĉirkaŭ la oka

vespere en la metroo, ni vidis multajn homojn dormi... starante !)

Sed kio pri la juna Ai-ĉan ? Ankaŭ ŝi havas rimarkindan historion. Unu konato portis ŝin al Hoeiĝuku simple por montri la komunumon. Fakte, grupoj da junuloj tre ofte vizitas tiun lokon por lerni pri terkultivado kaj lignoprilaborado (pri kio okupiĝas s-ro Tanizaki). La 12-jarulino estis tiom impresita, ke, reveninte hejmen, ŝi simple rifuzis iri al lernejo — ŝi volis loĝi en Hoeiĝuku. Bonŝance por ŝi, la gepatroj ne povis kontraŭi, kaj do ekde tiam ŝi estas plenrajta ano de la komunumo. Ŝia laboro estas zorgi pri la kokoj, ŝi diras kun fiero. Ai-ĉan tre ŝatas labori kun bestoj kaj volas iri al norda Japanio — Hokkajdo — por lerni bov-bredadon. Malsame ol siaj samaĝanoj, ŝi

ne iras al la lernejo. « Sed ĉu Ai-ĉan flue legas ? », mi demandas al s-ino Ŝima, kiam Ai-ĉan ne estis en la ĉambro. Ja estas pluraj miloj da ideogramoj por legi librojn kaj ĵurnalojn ! S-ino Ŝima ridetas kaj respondas jese : Ai-ĉan estas tre inteligenta kaj avida leganto. Fakte, ŝi sukcesas legi unu libron ĉiutage, kaj tiun saman tagon s-ino Ŝima devis veturigi la knabinon al sia plej ŝatata loko : la biblioteko de Fukui.

Ai-ĉan ĉiutage mem lernas ideogramojn kaj ekzerciĝas pri la skribado, kaj vintre, kiam estas malpli da laboro, s-ro Tanizake instruas al ŝi matematikon.

Ĉiutage unu persono el la komunumo estas kuiristo — same Ai-ĉan foje estas la kuiristo de la tago. Mi demandas al la knabino, ĉu ŝi ŝatas kuiru — kaj ŝia vizaĝo tute lumiĝas : jes, kompreneble ! Ĉiuj anoj de Hoeiĝuku ŝategas kuiru kaj estas tre lertaj pri tio. Mi demandas s-inon Ŝima (ŝi kuiris tute nekredeblan matenmanĝon, konsistantan el eble



deko da pladoj), kiu estas la plej bona kuiristo en la komunumo, kaj ŝi respondas ridante : « S-ro Tanizaki, kompreneble ! Li faras la plej bongustan suŝion en la mondo ! »

Veni... vidi... resti !

La juna Ai-ĉan ne estas la sola persono, kiu estis impresita de Hoeiĝuku ĝis tiu grado, ke ŝi decidis resti. Dum la

vespermanĝo nin vizitas alia junulino — bela kaj fortika 26-jara Juri, originale el Nagoja. Kvankam Hoeiĝuku ne estas profesia tranoktejo aŭ manĝejo, de tempo al tempo venas vizitantoj, al kiuj oni ofertas manĝaĵojn kaj tranokton (normale oni pagas modestan sumon, sed ili ne akceptis monon de

ni). En la komunumo mem ne estas interreto, tamen vizitantoj lasas bonegajn recenzojn en la reto, kio alportas aliajn vizitantojn. Do, ĝuste tio okazis pri Juri-ĉan : antaŭ iom da tempo ŝi vidis

foton de belega plado el kokaĵo kaj venis por gustumi ĝin. Ŝi do amikiĝis kun la komunumo kaj decidis resti tie : ŝi aĉetis domon kun terpeco en la proksimeco kaj ofte venas manĝi kun la anoj de Hoeiĝuku. Nur poste, kiam ŝi vidis, kiel oni mortigas la kokojn en la vera vivo, ŝi estis ŝokita. « Sed la manĝaĵo estas tiom nekredeble bongusta ! » ŝi aldonas kun kulpa rideto.

La tea ĉambro ĉambro odoras je herbo, kiu sekiĝas pendigita de la plafono (« estas preskaŭ neniu malsano, kiun ne povas kuraci tiu ĉi herbo », diras s-ino Ŝima). Ni babilas trinkante fortan britan teon kun la bongustega ŝifonkuko, preparitan por la kafejo, kiu funkcias sabaton kaj dimanĉon (pro multaj vizitantoj, ili devis oficialigi la tagojn, kiam eblas veni por manĝi en Hoeiĝuku). Ĉiuj anoj de la komunumo estas ridemaj kaj spontaneaj, kaj aspektas tute malstreĉitaj. Laborante tiom forte — terkultivado, konservaĵoj, ligno, kafejo, bestoj — kaj sen ferioj (« la bestoj ja ne ferias, ĉu ? », rimarkas s-ino Ŝima), ili fieras, ke ili tamen povas ĉiumatene tiel



S-ro Tanizaki montras al ni lignan libelon

sidi, senhaste, kaj simple ĝui la babiladon. Tiu komunumo, ŝajne, tute redifinis la signifon de riĉeco — ili estas riĉaj kune... Vintre, kiam estas malpli da agrikultura laboro, ili havas eĉ pli da tempo por babili kaj legi librojn, rigardante el la fenestro la neĝon fali...

Ni tranoktas en granda kampara 100-jara domo, kiun la komunumo ĵus aĉetis por gastigi la parencojn aŭ vizitantojn, kiel nin. Nek en tiu ĉi domo, nek en alia domo, oni ŝlosas la pordojn. La unuan fojon en multaj jaroj mi vidas tiom da steloj kaj endormiĝas kun la trankviligaj sonoj de la montara rivereto. Neniu surprizo, ke la urbanoj, ili tamen translokiĝis ĉi tien !

Reveninte de Obama al Kioto, ni iras rekte al la Esperanto-kunveno. Bedaŭrinde, oni devis prokrasti ĝin iomete, ĉar (tiom embarase !), ni prenis malĝustan trajnon... Nia bonega ĉiĉerono el Obama intencis pagi la bileton por simple eniri kun ni en la stacidomon kaj certigi, ke ni ne maltrafas nian trajnon, sed ni konvinkis lin, ke tio ne necesas : « Ni scias la tempon kaj la kajon, do, tute neniel eblas erari ! »

Bedaŭrinde, ja eblas, se temas pri ni ! « Ŝajnas, ke la trajno foriris kelkajn minutojn pli frue — ege stranga afero » — diris mia edzo nervoze. Ve ! La trajno foriris ĝustatempe, sed estis ni, kiu eniris en la pli fruan trajnon ! Ja en Japanio, kie la trajnoj venas tiom ofte, diferenco de du minutoj ege gravas... Bonŝance, la sekva trajno venis nur post duonhoro, kaj finfine ni alvenas al Esperanto-



domo, kie okazas la kunsidoj. « Esperanto-domo » estas, fakte, la oficiala nomo de tiu bela trietaĝa konstruaĵo, konstruigita de unu el la membroj de la Kiota E-grupo, s-ino Ajkaŭa.



En la serĉo de kimono

Dum nia tuta trisemajna vojaĝo ni preskaŭ ne havis tempon aĉetumi, sed tamen estis unu afero, sen kiu mi ne volis reveni de Japanio : kompreneble, la kimono ! Se vi ne havas kelkajn milojn da dolarojn por nova kimono, jen bona okazo aĉeti ĝin por nur kelkdek dolaroj (kvankam, uzitan) en la pul-bazaro apud la templo To-ĵi en Kioto, kiun rekomendis al ni nia kiota gastigantino, s-ino Tahira. La bazaro funkcias nur la 21an tagon de la monato — en tiu speciala tago ĉiuj povas senpage viziti la templon, apud kiu staras la plej alta ligna konstruaĵo en la tuta Japanio : preskaŭ 55 metrojn alta pagodo ! Krom uzitaj kimonoj, tradiciaj ŝuoj kaj ceteraj vestaĵoj, vi povas trovi tie... esence, ĉion ! La plurcent butikoj vendas ĉiajn brokantaĵojn, artaĵojn, teumaĵojn, bonsaĵojn, mangĉaĵojn kaj trinkaĵojn. « Atentu pri via monujo

kaj ne kedu la ĉarlatanojn », avertas Minoru, la edzo de s-ino Tahira, kiu afable konsentis ĉiĉeroni nin al la bazaro. Post kelkaj horoj da serĉado ni konstatas, ke ni tute ne povas trovi sufiĉe longan

kimonon — eĉ se la nuntempaj junaj japanoj estas preskaŭ samaltaj kiel ni, la malnovaj kimonoj estis faritaj por pli aĝa generacio, kiu estis malpli alta. Post kelkaj horoj da serĉado en 35-grada varmeco ni konstatas, ke ni simple ne kapablas serĉi plu : ĉiuj koloroj kungluiĝas en unu ĉielarkan amason. Malvarma biero en klimatizita kafejo ŝajnas al ni paradizo.

Kiel mi fariĝis japanino

Sekvatage, en la kompanio de s-ino Tahira, ni kompletigis nian kimonan edukadon vizitante la centron pri teksado en la historia kvartalo Niŝiĝin, mondfama pro sia teksa metio kun impresa pli ol mil-jara historio. Tie oni montras la fajnajn artojn de ĉio ligita al kimonoj : teksado, farbado, plektado de zon-ŝnuro (kiel mi eksciis poste, eĉ la faldado de kimono estas scienco : preskaŭ kiel origami !). Oni eĉ povas mem provi kelkajn metiojn, kaj mi, sub la gvido de majstro, faras pentraĵon sur silko. La majstro-farbisto donas al mi la silkaĵon kaj —



tute neatendite — donacas sunombreton ! Sunombretoj estas tre gravaj akcesoraĵoj por japaninoj : esence ĉiuj, junaj kaj aĝaj, portas ilin, eĉ surbicikle. Do jen la unua paŝo al mia japaniĝo : mi komencas porti sunombreton, kiel ĉiuj aliaj virinoj !

Niŝiĝin ankaŭ tre famas pro la demonstrado de kimonoj — oni povas eĉ provi sin en la rolo de modelulino ! Ni lernas, ke estas striktaj reguloj pri la koloroj kaj la stiloj : needziĝintaj junulinoj portas kimonojn kun frapaj koloroj kaj desegnaĵoj, kun longaj manikoj (preskaŭ ĝisplanke). Pli maturaj geedziĝintaj virinoj portas pli subtilajn kolorojn, kaj la manikoj estas mallongaj (fakte, oni faras kimonojn tiamaniere, ke oni povas mallongigi la manikojn post la geedziĝo). Aldone al kimono, oni devas havi plurajn akcesoraĵojn : sandalojn, ŝtrumpojn, plurajn zonojn, mansakon... Foje la akcesoraĵoj kostas same (aŭ pli) ol la kimono

mem, sed ne surprize : la mana plektado de unu ŝnuro, kiu iras super la zono, daŭras ĉ. dek horojn, diras al ni la metiistino : profesiuloj kiel ŝi povas fari 15 cm en unu horo ! Alia nepra akcesoraĵo estas subkimono, ĉar por ĝuste purigi la kimonon oni devas... tute malkudri ĝin, lavi, sekigi kaj tiam rekudri ! Sed, ĉar tio estas tiom malfacila (aŭ multekosta, se tion faras profesia servo), oni portu ĝin tre atente kaj prefere... simple ne lavu !

Rigardante tiajn belajn kimonojn, mi tute ne sciis, ke vespere, dum la kunveno kun esperantistoj en la Kiota Esperanto-domo, min atendas grandega surprizo. Ĉar mi volis fotiĝi en japanaj vestaĵoj, membro de la kiota grupo — profesia kantistino, s-ino Noda — speciale por mi portis unu el siaj someraj kimonoj (jukata). « Bone, ke mi portis la grandan », ŝi kriis vidinte min. Tri personoj helpas al mi vestiĝi en belega malhela jukata — post dekkvin minutoj da magio, oni ne plu povas rekoni min (jen la dua paŝo al mia japaniĝo) ! Mi kun fiero portis la jukatan dum la tuta vespero, kaj je la fino de la amuzplena (kaj kantoplena) kunveno, s-ino Noda diras, ke ŝi donacas al mi la jukatan... kaj manfaritajn zonojn, kaj subkimonon kaj ĉion alian ! Vere, mi ne povis kredi... tio ja estis la plej



Mia « japana familio »
(s-ino Noda meze)

luksa donaco iam ajn ! Grandegan dankon al vi, denove kaj denove !

La tria paŝo al mia japaniĝo

« Mia edzo estas freneza » — tiel mi notas en la notlibro pri la komenco de la sekva tago. Ankoraŭ antaŭ la vojaĝo li tre volis fari japanstilan geedzigan ceremonion — tamen, pro la ekstrema

varmeco li forlasis tiun ideon, sed li ne forlasis la ideon fotiĝi en tradiciaj japanaj geedziĝaj vestaĵoj. La kosto de la vestado, ŝminkado kaj unu foto estis tute akceptebla, kaj do matene ni iris al la fotejo. Oni ŝminkas min dum preskaŭ horo, kaj vestas dum plia duonhoro : komence oni striktigas mian bruston per kaŭĉuka rubando (la busto devas esti

nerimarkebla en tradiciaj japanaj vestaĵoj), kaj poste surmetis kvar tavolojn da kimonoj, kaj plurajn zonojn kaj ornamaĵojn. Fine, oni kronas min per belega (sed ekstreme peza) peruko, kaj, kiam mi finfine rigardas en la spegulo, mi vere ne plu povas rekoni min. « Vi aspektas kiel japana pupo », diras la stilistino, kiu ŝajne mem ne atendis tian rezulton!



Mi estas tute ravita ! Tamen, mi preskaŭ ne povas spiri kaj malfacile staras rekte, sub la pezeco de la peruko : mi ne povas imagi, kiel iu ajn povas travivi tradician japanan geedziĝon en neklimatizita ejo ? Kiel poste rakontis al ni s-ino Tahira, unu ŝia konatino svenis dum geedziĝo, pro la varmeco kaj la peruko. Mi envas al Joel, kies tuta vestado daŭris nur dek minutojn, kaj mi kompatas la nobelulinojn de antaŭ mil jaroj, kiuj devis porti 12 tavolojn da kimonoj, kaj same majkojn (lernantajn gejšojn) kaj gejšojn, kiuj, malgraŭ la peruka suferado, devas ankaŭ muziki kaj danci ! Mi esperas, ke oni rapide



faros tiun unu foton, por kiu mi devas tiom suferi — sed oni faras centon ! Mia kapo doloregas. Finfine, oni forprenas la perukon — jen venas fino de la torturoj. Sed ne ! Jen komenciĝas la *vera torturo* : nun ni devas elekti la foton. *La foton*, ĉar ĉiu aldona foto venas kun aldona kosto ! Tiom suferi por nur unu foto ?! Nu, kun iom da negoco, ni tamen aĉetas la plejparton de ili, eĉ se tio kostis muulte pli ol ni planis. Nun vi komprenas, kial mia edzo estas « freneza » !

(daŭrigota)

Eleanor Roosevelt, « originalulino en la Blanka Domo »*

Minjo Renaud

*À l'occasion du 8 mars, journée internationale des femmes, voici une personnalité inspirante : Eleanor Roosevelt, « une originale à la Maison-Blanche ».**

Okaze de la 8-a de marto, internacia tago de la virinoj, jen inspira personeco : Eleanor Roosevelt (1884–1962). Koreca kaj agema virino, ŝi engaĝiĝas en la feminisma movado kaj, dum sia tuta vivo, defendas la nigrulojn, malriĉulojn kaj ekskluzivitojn.

Vera konscienco progresema de sia edzo, Franklin Delano Roosevelt (prezidento de Usono, 1933–1945), ŝi estos rigardata, dum la jaroj 1950, kiel unu el la plej influaj virinoj en Usono kaj en la mondo. Ŝi estis, interalie, la unua prezidanto de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj direktis la komitaton, kiu redaktis la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj, proklamitan en 1948.

Vikipedio enhavas, en diversaj

lingvoj, inkluzive Esperanton, sufiĉe ampleksajn artikolojn pri ŝi. La plej bona biografio pri ŝi estus tiu de Blanche Wiesen Cook, *Eleanor Roosevelt* (2-voluma, Novjorko, Viking, 1992, 1999).

* Tiel titoliĝis prelego de la historiisto André Champagne en Collège Jean-de-Brébeuf, la 4-an de marto 2013 : « Eleanor Roosevelt, une originale à la Maison-Blanche ».



Eleanor Roosevelt en 1949 kun la hispana teksto de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj (Vikipedio)



Roosevelt-monumento en Vaŝingtono

Pacaj mesaĝoj el Hiroŝimo



Chaque année, à l'occasion de la Journée internationale de la femme, la Société d'espéranto de Hiroshima collecte des messages des espérantistes à travers le monde. Voilà un exemple de l'espéranto comme pont à la paix, la collaboration et la solidarité internationale !

Red. : Pasintsomere ni vizitis Hiroŝimon, malĝoje konatan al la tuta mondo pro la atombombado. Travivinte tian grandegan tragedion, la urbo estas tre engaĝita en porpaca agado. Ekzemple, ĝi komencis la movadon « Urbestroj por paco » (agado por paco kaj abolo de nukleaj armiloj fare de urbestroj), en kiu jam membras urbestroj de 5.551 urboj el 156 landoj. Kaj, cetere, Hiroŝimo estas ĝemel-urbo de Montrealo !

Ankaŭ Hiroŝima Esperanto-Centro multe agadas por paco. Fakte, dum nia vojaĝo al Japanio en aŭgusto 2012, niaj gastigantoj en Hiroŝimo estis paro de tre aktivaj esperantistoj : s-ino Taeko kaj s-ro Moritaka Oŝioka, kiuj ekde 2002 kolektas mesaĝojn de esperantistoj okaze de la Internacia Virina Tago, la 8a de marto.

Ĉiujare estas malsama temo: ekzemple, en 2012 ĝi estis « Ni bezonas ne nukleajn armilojn nek nukleajn centralojn. Ni bezonas pacan kaj puran mondon » (omaĝe al la tragedio en Fukuŝima), kaj

ĉi-jare ĝi estas « Feliĉo de Virinoj ». La kampanjo estas enorme sukcesa : ĝi ĉiujare ricevas ducenton da mesaĝoj el pluraj dekoj da landoj (ĉi-jare venis 223 mesaĝojn el 57 landoj [47 el Francio]). Ĉiuj mesaĝoj estas tradukataj en la japanan lingvon kaj ekspoziciataj al la publiko. Jen bona ekzemplo, kiel Esperanto povas servi en internaciaj rilatoj kaj samtempe reklami Esperanton ! S-ino Oŝioka, vicprezidanto de la plenuma komitato, rakontas al La Riverego pri la kampanjo.



Taeko Oŝioka

« En Hiroŝimo tiu evento daŭre okazadas pli ol 30 jarojn. De antaŭ 25 jaroj mi partoprenis kiel komitatanino reprezentante mian instruistan sindikaton. Sed mia edzo ĉiam kritikis, ke la Tago ne estas internacia, ĉar membroj kaj temoj estas preskaŭ ĉiam enlandaj.

Antaŭ 13 jaroj venis komputilo al nia hejmo, kaj de tiam ni komencis labori internacie por la Tago. Rete ni lanĉas nian mesaĝon por paco al



esperantistoj en la mondo, ricevas respondojn de ili, kaj havas ekspozicion de mesaĝoj. Esperanto kaj interreto facile ebligas internacian interŝanĝon.

Plejparto de la mesaĝoj venas de privataj unuopuloj, dum iuj peras mesaĝojn de organizoj aŭ asocioj ekster Esperantujo. Ekzemple, pasintjare pola samideanino peris mesaĝon de urba filio de Eŭropa Unio de Virinoj, kaj rumana samideanino prezentis la alvokon el Hiroŝimo en kunveno de socia grupo de 100 virinoj kaj sendis respondon al ni. Francoj peris mesaĝon nome de 53 membroj de korusa grupo kaj de Domo de Virinoj, ktp. Rusa samideano peris mesaĝon de kunveno de 24 sociaj organizoj en la regiono de

Vladivostoko. Cetere, iu urba kultura asocio en Slovenio petis nin sendi dokumentojn pri Hiroŝimo por ekspozicii ; ni kontaktis Pac-muzeon, kaj ili sendis materialon por ekspozicio de atombombado al Hiroŝimo-Nagasaki. Tiel en Slovenio, Svislando, Francio kaj Italio esperantistoj organizis ekspoziciojn.

Ĉiujare ricevante, legante kaj tradukante mesaĝojn el tuta mondo, mi certe sentas internacian solidarecon de esperantistoj kaj imagas geamikojn malantaŭ ĉiu mesaĝo. Esperanto kiel ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo realiĝas, mi sentas. »

« Ni havas tri nukleajn elektrocentralojn, kaj unu plian en konstruado. Ĉiuj kvar uzas la saman teknikon de elektra generado kiel la japanaj. Ĉiuj kvar centraloj « sidas » sur aŭ apud tertremaj zonoj. La registaro decidis plilongigi la servodaŭron de la unua kaj la dua centraloj kaj ne ĉesigi la konstruon de la kvara. Plue, niaj elektrocentraloj estas tiel proksimaj de metropoloj, ke, se katastrofo okazus, milionoj da loĝantoj bezonus evakuiĝi, kio estas preskaŭ nefarebla tasko. Neniu povas antaŭdiri, kiam katastrofo pro natura aŭ homfarita kaŭzo okazus. La katastrofo ĉe Fukuŝima estas al ni ĝustatempa averto. » (s-ro el Tajvano)

Seniora e Senior Smith — amuza sceno en interlingua

Francisko Lorrain

Voici un petit texte amusant tiré du manuel classique d'interlingua, d'Alexander Gode.

Antaŭ Kristnasko, mi aĉetis brokante la klasikan manlibron pri la planlingvo interlingua, titolitan *Interlingua a prime vista* [Interlingua je unua vido], de Alexander Gode (Novjorko, Storm, © 1954). La teksto en ĝi estas sufiĉe amuzaj. Temas pri adaptaĵo de metodo pri la hispana, *Spanish at Sight*, de Clark Stillman kaj Alexander Gode (Novjorko, Thomas Y. Crowell, 1943). Jen unu el la scenoj en la libro (pp. 50–51).

Seniora Smith se interessa multo pro le nove secretaria de su marito. Proque se interessa illa pro iste secretaria ? Post toto, le secretaria non se interessa pro illa !

Seniora Smith pensa : ????

Seniora Smith dice : Como es illa ?

Senior Smith pensa : Mi Deo !

Senior Smith dice : Qui ?

Seniora Smith pensa : Idiota !

Seniora Smith dice : Le nove secretaria, naturalmente.

Senior Smith pensa : Illa es un perla.

Senior Smith dice : Assi, assi. Illa non es mal.

Seniora Smith pensa : Aha, illa non es mal.

Seniora Smith dice : Como se appella illa ?

Senior Smith pensa : Anna.

Ille dice : Illa se appella... Io crede su nomine es senioreta Canario.

Seniora Smith pensa : Ille crede...

Illa demanda : Parla illa multo ?

Ille pensa : Non tanto como mi marita, gratias a Deo.

Ille responde : Illa non es al bureau pro parlar.

Illa pensa : Vermente ? Alora, que face illa ?

Illa demanda : Es illa un bon travaliatrice ?

Ille pensa : Bonissime.


Ille responde : Satis bon.

Illa pensa : Travalia illa in le bureau private de mi marito ?

Illa demanda : Con qui travalia illa ?

Senior Smith pensa : Con me, naturalmente.

Ille demanda : Como, « con qui ? »



Seniora Smith pensa : Ille non vole responder, evidentemente.

Illa dice : Si, con qui ? In le bureau de qui ? In cuje bureau ?

Ille pensa : Infelicemente non in mi bureau private.

Ille responde : In un de nostre bureaus.

Illa pensa : Qual vage responsa !

Illa dice : Certemente, sed in le qual ?

Ille pensa : Qual curiositate !

Ille responde : In le bureau del machinas a scriber.

Illa pensa : Es illa belle ?

Illa demanda : Qual typo de persona es illa ?

Ille pensa : Un typo meravigliose.

Ille responde : Illa es un secretaria. Un como multes.

Illa pensa : Como multes ?

Illa demanda : Quante annos ha illa ?

Ille pensa : Vinti ? Vinti-un ?


Ille dice : Isto es difficile a dicer. Inter dece-cinque e cinquanta annos.

Illa pensa : Io debe vider la.

Illa dice : Pote io facer su cognoscentia ?

Ille pensa : Diabolo !

Ille dice : E io, pote io leger mi jornal ?



La Bona Lingvo

Enkonduko al la libro « *Esperanto estas facila* » de R. Corsetti

Anna Lowenstein

la.bona.lingvo@gmail.com | <http://www.bonalingvo.org>

Tiel ni ĉiam prezentas la lingvon en niaj propagandiloj, ĉu ne ? Fiere ni ilustras, kiel eblas krei tutan serion da vortoj surbaze de la sama radiko : *ĉevalo, ĉevala, ĉevale, ĉevalino, ĉevalido, ĉevalejo ; bela, bele, beleco, belulo, beli, beligi ; unu, unua, unuo, unueco, unuiĝo, unuigi* — kaj kontrastas tion kun la neregulaj kaj pluroblaj radikaroj de aliaj lingvoj.

Kiel ĉiu artisto scias, simpleco ne estas facile akirita. Poeto ŝvitas dum horoj, fortajlante nenecesajn vortojn, ĝis restas nur unu perfekte tornita frazo. Simile, Zamenhof laboris dum pli ol jardeko por atingi ĉefverkon de simpleco.

La facileco de Esperanto efektive estas motivo por lerni ĝin ; tial, cetere, mi mem ekinteresiĝis pri ĝi. Ĝia facileco tenas la entuziasmon de lernantoj, kiuj rimarkas post malmultaj lecionoj pli grandan progreson, ol eblus eĉ post plurmonata studado, se ili lernus alian lingvon.

Unu el la plaĉaj aspektoj por novaj esperantistoj estas la ebleco mem krei vortojn : ne per

enkonduko de novaj radikoj, sed per kombino de ekzistantaj radikoj kaj uzo de sufiksoj. Kiel instruisto mi rimarkas, ke komencantoj aparte ĝuas la lecionon pri la *mal*-vortoj : ili malkovras kun plezuro, kiel lerninte *longa, nova, juna* ktp. ili mem povas krei *mallonga, malnova, maljuna*.

Esperanto havas la aspekton de latinida lingvo, kaj tial parolantoj de tiuj lingvoj tro facilanime emas enkonduki novajn vortojn. Se oni ne scias, ekzemple, kiel diri *illegal* aŭ *editorial*, estas multe pli facile diri *ilegala* aŭ *editorialo*, ol cerbumi, kiel plej trafe esprimi tiujn konceptojn en Esperanto. Mi kredas, ke alta proporcio de la vortoj, kiuj plenigas niajn vortarojn, ekaperis en la lingvo pro nepensemo de parolantoj. Tiel ili faciligas la lingvon por si mem, sed ne nepre por siaj legantoj aŭ aŭskultantoj. Por ke Esperanto retenu sian simplecon, necesas *pensi*.

Aliaj vortoj aperis tutsimple pro eraroj. Kiam amaso da homoj, ekzemple, kune marŝas tra la stratoj por fari politikan proteston, tio estas *manifestacio*. Por parolantoj de eŭropaj lingvoj,

estas tro facila eraro nomi tion *demonstracio* — tiun vorton mi eĉ foje vidis en revuo *Esperanto* (ne lastatempe, sed antaŭ 10-15 jaroj). Por eviti tiajn erarojn, necesas kontroli en vortaro, kiam oni ne certas pri vorto, anstataŭ senpripense supozi, ke oni jam scias. Mi memoras, kiel mi mem, kiel nesperta sed tre entuziasma esperantisto, preskaŭ skribis la vorton *parmezano* [piv] sur mian aĉetliston. Poste mi pensis, ke tamen estus bona ideo kontroli en la vortaro, kaj malkovris, ke tio nomiĝas en Esperanto *parma fromaĝo* (t.e. fromaĝo el la urbo Parma). « Ha, kompreneble ! » mi pensis. « Kiel bonŝance, ke mi kontrolis ! » La problemo estas ne nur, ke nespertuloj ne kontrolas, sed ke poste la vortaroj reprenas kaj disvastigas iliajn erarojn. Alia granda fonto de tiaj eraroj estas Vikipedio, en kiu nun ja aperas la kapvorto *Parmezano*. Konsiderante la fakton, ke tiu itala fromaĝo nomiĝas en la itala *parmigiano*, tiu angla-franca formo vere ne havas sencon.

Neniu normale provus aldoni novan radikon al nature evoluinta lingvo, sed, ĉar Esperanto estas artefarita, eĉ komencantoj opinias, ke ili rajtas kaj povas plibonigi la laboron de Zamenhof. Mi legis iam proponon pri nova vorto *ekvila* en la kunteksto *ekvila komerco*. Kiel Esperanto elturniĝis dum la lastaj 120 jaroj sen la vorto *ekvila* ? Tre simple : per la vorto *justa*. Tiun

ekzemplon vi ne trovos en la paĝoj de La Bona Lingvo (bonŝance tiu propono estis mortnaskita), sed amason da aliaj: *cis*, *humanitara*, *violenta* ktp. ktp.

Iuj esperantistoj opinias, ke ili rajtas proponi ŝanĝon al la vorttrezoro, tutsimple ĉar ili ne ŝatas ekzistantan vorton kaj pensas, ke alia formo estus pli bona aŭ pli bela. Tiel, apud la Fundamentaj vortoj *kruro*, *besto*, *vinbero* kaj *presi* aperis *gambo*, *animalo*, *uvo* kaj *printi*. La ĉiama preteksto estas, ke estas iu esenca distingo en la signifo: ekzemple, ke *kruro* rilatas nur al la parto inter la piedo kaj la genuo, dum *gambo* estas la tuto ; aŭ ke *animalo* rilatas al ĉiuj bestoj inkluzive de la homo. La praktika (kaj certe ankaŭ la celita) rezulto estas iompostioma anstataŭigo de la Fundamentaj vortoj per aliaj pli laŭ la gusto de ties uzantoj. La sekvo estas, ke anstataŭ lerni nur unu vorton, komencantoj devas lerni du kun praktike la sama signifo — ĉar, kompreneble, la malnova formo ne falas el la uzado. Kien do malaperis la facileco de Esperanto ?

Por lernantoj de Esperanto estas tre kuraĝige konstati, ke ili mem povas per kombino de radikoj kaj sufiksoj multoblige sian vorttrezoron. Bedaŭrinde, iuj esperantistoj kredigas al ili, ke tiaj kunmetitaj vortoj ne estas serioza parto de Esperanto, ke ili apartenis al primitiva fazo de la

lingvo, nun superita. Tiun vidpunkton mi iam aŭdis ankaŭ de nesperta esperantisto : ŝi plendis, ke ŝi ne havas sufiĉe grandan vortprovizon en Esperanto — jes, ŝi scias, ke eblas mem krei vortojn, sed ŝi volas lerni la « ĝustan » nomon de la koncerna objekto. Evidente, ŝiaj instruistoj jam konvinkis ŝin, ke la kunmetaĵoj, kiujn ŝi mem elpensas, estas duarangaj anstataŭaĵoj, uzindaj nur se oni ne konas la « veran » terminon.

Ni ĉiuj konas la faman rakonton pri la eta Ludoviko kaj la dolĉaŭvendejo : ke vidante la rusan vorton *konditerskaja* (sukeraĵejo) li ekkomprenis, kiel per sistemo de afiksoj li povos limigi la bezonatan radikaron de sia nova lingvo kaj tiel faciligi la taskon de lernantoj. Ĉu ne plu validas tiu brila inspiro de Zamenhof ? Ŝajne ne — precipe dum ĉiu duonbakita duonkomencanto kredas, ke li aŭ ŝi rajtas proponi aldonojn al la vortaro. Tiel ekestas situacio, en kiu la radikaro konstante kreskas, kaj lernantoj estas devigataj dediĉi horojn por studi ĝin. Tion sugestas, ekzemple, la paĝaro *lernu!* per sia rubriko « Vorto de la tago », kiu rekomendas amason da nenecesaj vortoj : *lokalizi, delico, akomodati, fetoro, sukuri* k.s.*

Kunmetado estas la kerno de la esperanta vortfara sistemo. Ni ne donu al komencantoj listojn de novaj vortoj parkere lernendaj ; anstataŭe ni montru al ili, kiel, surbaze de malgranda radikaro


ili povos mem esprimi preskaŭ ĉiujn normale bezonatajn konceptojn.

Petu kaj vi ricevos senpage per la reto la komputilan version de la libro « *Esperanto estas facila* ». Skribu simple pet-mesaĝeton al [renato\(ĉe\)esperanto.org](mailto:renato(ĉe)esperanto.org).

* Red. : Ĉiuj ĉi vortoj estas PIV-aj vortoj, dum la vortoj « lokalizi », « akomodati » kaj « fetoro » estas eĉ Zamehnofaj.

Le rapport Grin

Commandé par le Haut Conseil de l'Évaluation de l'École à François Grin, professeur d'économie à la Faculté de traduction et d'interprétation de l'Université de Genève, ce rapport s'intitule [L'enseignement des langues étrangères comme politique publique](#) (oct. 2005) et peut être téléchargé gratuitement. Il fait le compte des économies que l'espéranto permettrait de réaliser dans l'Union européenne s'il était adopté comme solution aux problèmes de communication linguistique dans l'UE : une somme de 25 milliards d'euros annuels qui sont en quelque sorte notre impôt versé à la Grande-Bretagne sans que notre monde politique ne s'en préoccupe. (Source : *esperanto-Vendée*, mars 2013.)



125 + 50 + 30 = 42

42 esperantistoj de partoj de la mondo (et 2 de Usono) kunvenis la 15an de decembro 2012 por festi la 125an datrevenon de Esperanto, la 50an datrevenon de la klubo de Montrealo kaj la 30an datrevenon de la Societo de Esperanto de Montrealo.

La lasta Zamenhof-tago (aŭ jarfina festo, se vi preferas) estis enorme sukcesa kaj tre nekutima : ni ja festis en tiu tago tri grandajn datrevenojn : la 125-jariĝon de Esperanto, 50-jariĝon de Montreala Esperanto-klubo kaj 30-jariĝon de ESK. La festo kolektis 42 personojn de tuta Kebekio (estis eĉ vizitantoj de Gatineau kaj Saguenay), kaj du partoprenantoj venis kunfesti el Usono ! Nia prezidanto, Normand Fleury, havis malfacilegan taskon prezenti la tutan 30-jaran historion de ESK ene de unu horo (kion li elstare faris !), kaj

Zdravka Metz prezentis la unuan ekzempleron de la libro « 30 jaroj da agado », kiun ŝi kun helpantoj sukcesis fari ene de nur kelkaj monatoj. Sylvain Auclair (nia « Lacerto » el *La Riverego*) estis honorita kaj ricevis la plej novan version de PIV, kiu certe helpos al li en la verkado kaj provlegado. Alia honorulo de la vespero estis Jean Sorel, pro siaj pluraj jardekoj da Esperanto-agado. La evento okazis en bonega (kaj popularega) bierejo *L'Amère à boire* en Montrealo, kie nia grupo okupis la tutan duan etaĝon.



István Ertl instruos en NASK (Raleigh, NC)

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) — la plej longdaŭra Esperanto-kursaro en Norda Ameriko (kun pli ol 40-jara historio!) kaj unu el la plej bonaj en la mondo — bonvenigas vin ĉi-jare en Nord-Karolino ! NASK estas unika kleriga evento, kiu altiras lernantojn de ĉiuj lingvoniveletoj kaj ankaŭ profesiajn Esperanto-instruistojn de la tuta mondo.

Kiel en la lastaj du jaroj, ankaŭ NASK-2013 prezentas mallongan sesion, ĉi-foje en Raleigh, la ĉefurbo de Nord-Karolino. Alvenu la 26an de junio kaj foriru la 5an de julio — jen ok tagoj da lernado, amuziĝo kaj esplorado de la belegaj muzeoj, variaj restoracioj kaj registaraj konstruaĵoj en Raleigh, ĉio en promendistanco de la kampuso.

La internacia teamo konsistos el István Ertl (Hungario), Derek Roff (Usono) kaj Lee Miller (Usono), kaj okazos tri kursniveletoj. Hoss Firooznia estos la help-instruisto kaj gvidos la eksterklasajn



programojn. Ĉi-jare, la studentoj povos resti post NASK por partopreni en la landa kongreso de Esperanto-USA (5-8a de julio, ĝi okazos en la sama kongresejo kaj loĝejo). Por partopreni la landan kongreson, bonvolu fari la necesajn aranĝojn ĉe www.esperanto-usa.org.

La ĝenerala kotizo por NASK 2013 (kursoj, loĝado kaj manĝoj) estas 725 USD antaŭ la 22a de marto, kaj 775 USD poste (specialaj prezoj por lokanoj !). Oni loĝos en du-personaj ĉambroj kun la banĉambro dividita kun alia dormoĉambro (por loĝi en aparta ĉambro, alpagu 180 USD). Stipendioj haveblas por plentempaj studentoj kaj instruistoj, kaj ankaŭ loĝantoj de Latin-Ameriko.

Bonvolu kontakti Ellen M. Eddy, la administranton ([EDDYELLEN\(ĉe\)aol.com](mailto:EDDYELLEN@aol.com)),

por pli da informoj, aŭ vizitu la NASK-retejon : <http://esperanto.org/nask/>.

(Fonto : esperantic.org)



Esperanto-renkontiĝoj

18-20a de majo 2013 : 10a MEKARO

Otavo, Ontario

20-27a de julio 2013: Universala Kongreso

Rejkjaviko, Islando

12-14a de oktobro : 20a ARE (Silver Bay, Lake George)

Novjorkio, Usono

17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO

Sherbrooke, Kebekio

16-18a de majo 2015: 12a MEKARO

Toronto, Ontario

21-23a de majo 2016: 13a MEKARO

Granby, Kebekio

provizore: 14a MEKARO (2017) : Kingstono (Ontario) ; 15a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo 22a de marto 2013, 18 h*

MEDO

Brita manĝo (alportu ion !)

Vendredo 12a de aprilo 2013, 18 h*

Commensal (sube)

Vendredo 26a de aprilo 2013, 19 h 30

MEDO

Vendredo 10a de majo 2013, 18 h*

Commensal (sube)

Vendredo 24a de majo 2013, 19 h 30

MEDO

Vendredo 14a de junio 2013, 18 h*

MEDO

Usona manĝo (alportu ion !)

Vendredo 13a de septembro 2013, 18 h*

Commensal (sube)

* Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30

Commensal St-Denis (restaurant végétarien / flexitarien) : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, metro « Berri-UQAM »). **MEDO (Montreala Esperanto-Domo)** : 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2013.5.20

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseillère), Den Drown (conseiller).



En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca



Montreala Esperanto-Domo (MEDO)

6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

Vidu retejon por vidi kiel atingi

Voir site web pour un plan d'accès

Biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo

Bibliothèque sur rendez-vous seulement



Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ce vi :

www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti

Jenja Amis

(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

